

La Riverego

Kebekia esperantista bulteno

Ĉu la Esperanto-Societo Kebekia kuras al la rando de klifo?

Ĉu ESK mortos? Ĉio indikas, ke tio eblas, pro manko de novaj aktivaj membroj.

Sylvain Auclair

Ĉi-aŭtune okazos eble la plej grava ĝenerala kunsido en la historio de ESK. Kutime, ĉiun duan jaron, kiam la Societo devas, laŭstatute, reelekti sian estraron, pli-malpli reprezentigas la samaj membroj. Kiam mankas interesataj homoj, Normando aŭ alia estrarano persone invitas iun aŭ alian aliĝi al la estraro. Ni ne faris tion por konservi la povon, kiel iuj foje opiniis, sed simple ĉar neniam sufiĉe da membroj emis kandidatiĝi.

Memoru, ke la estraranoj de ESK ne vere estras ion ajn: ili aktivis por Esperanto, tutsimple...

Ĉi tiun jaron, la aferoj verŝajne funkcios alie. La prezidanto de du jaroj ne plu emas esti membro de la estraro. La vic-prezidanto estas malsana. Normando, nun kasisto, nepre volas lasi tiun postenon, kiun li juĝas ne taŭga al siaj kapabloj. (Kaj mi aldonu, ke mi tute ne volas reekhavi la kasistajn librojn.) NI BEZONAS NOVAJN ESTRARANOJN!

Cetere, tio sentiĝas jam de pluraj monatoj. Ni ne plu havas agademon. Ni ne kunsidis jam de monatoj. Pluraj el ni aktivis en la kebekia Esperanto-movado jam de jaroj kaj foje ŝajnas al ni, ke ni konstruis nenion. Almenaŭ estas memevidente, ke ni ne konstruis novan generacion, kiu agadus apud ni, aŭ anstataŭ ni, aŭ eĉ forpuŝus nin el la estraro! Ne! Ni simple elprovis ĉiujn niajn ideojn, kaj spektis malrapidan malkreskon de nia Esperanto-movado.

Plej multaj el vi ne scias, aŭ memoras, kial oni fondis la Esperanto-Societon Kebekian. Nia asocio establiĝis, ĉar ni volis agadi kaj ofte renkontiĝi, kaj ni sentis, ke tio ne eblas kadre de la Kanada Esperanto-Asocio, kies ununura agado estas la jara kongreso, ie aŭ aliloke en Kanado. Ni do fondis apartan asocion kaj organizis jare po du aŭ tri tutkebekiajn semajnfajn renkontiĝojn, kiuj ĝenerale kunigis tridekon aŭ pli da homoj. Krome estis du kluboj en Montrealo kaj unu en Ŝerbruko, kiuj kunsidis almenaŭ po du fojojn monate.

Sed ne pensu, ke ĉiam aktivis la samaj homoj. Tute ne! En nia Societo kaj en ĝia grupo de aktivaj membroj, pasis pluraj dekoj da Esperantistoj, ofte junaj, kiuj plej ofte malaperis post kelkaj jaroj. Tio estas eble la plej bedaŭrinda kaj priplorinda

Est-ce la fin de la Société québécoise d'espéranto?

Est-ce la fin? Tout semble indiquer que le manque de nouveaux membres actifs pourrait signifier la mort de la SQE.

Sylvain Auclair

Cet automne aura lieu l'assemblée générale la plus importante de l'histoire de notre société. Habituellement, tous les deux ans, alors que nous devons élire un nouveau conseil d'administration, on voit plus ou moins les mêmes têtes se représenter. Et, quand on manque de candidats, Normand ou un autre administrateur invite personnellement une personne ou une autre à se commettre. Nous ne faisons pas cela pour conserver le pouvoir, malgré ce que certains ont pu en penser, mais tout simplement parce qu'il n'y avait jamais assez de candidats.

Bien sûr, être membre de notre CA ne donne pas droit à des jetons de présence ni même de pouvoir sur quoi que ce soit; il s'agit simplement de ceux qui travaillent concrètement (et gratuitement) à l'avancement de l'espéranto au Québec.

Mais cette année, les choses se passeront autrement. Le président sortant, en poste depuis deux ans, veut quitter le conseil. Le vice-président est malade. Normand, maintenant trésorier, veut à tout prix quitter ce poste, qu'il juge mal adapté à ses compétences (et j'ajouterais que je suis très loin de vouloir récupérer les livres de compte). IL NOUS FAUT DE NOUVEAUX ADMINISTRATEURS!

D'ailleurs, la situation dure depuis un certain temps. On ressent au CA une lassitude certaine. Il n'y a pas eu de réunion depuis déjà quelques mois. Plusieurs d'entre nous sommes actifs au sein de la SQE depuis plusieurs années et il nous semble parfois que nous n'avons rien su construire. À tout le moins, nous n'avons pas su construire une relève, des jeunes qui travailleraient avec nous, ou même contre nous, voire qui nous auraient expulsés du conseil depuis longtemps!

Non! Nous avons épuisé nos idées et assisté à une lente décroissance du mouvement espérantiste au Québec. Peu d'entre vous se souviennent pourquoi on a fondé la SQE. Nous voulions alors agir pour l'espéranto et nous réunir plus souvent, et nous sentions que cela n'était pas possible dans le cadre de l'Association canadienne d'espéranto, dont la seule activité reste le congrès annuel, tenu çà ou là au Canada. Nous avons



afero... Kelkaj el ili eĉ estis membroj de la estraro, sed, plej ofte, ili simple volis helpi, aŭ eble proponi kelkan projekton. Tio estas ja utila kaj interesa, sed asocio ankaŭ bezonas homojn, kiuj sentas sin respondecaj pri ĝi kaj pretas plenumi eĉ malinteresajn kaj ripetecajn agojn...

Kuŝas do antaŭ ni tri ĉefaj eblaj vojoj: aŭ ni trovas kelkajn interesatajn membrojn, kiuj pretos repreni la societon (kun la helpo de la malnovuloj, se ili deziras ĝin) kaj konduki ĝin kun novaj fortoj; aŭ ni devos malfondi la asocion, kio estus tre malĝojiga por tiuj, kiuj tiel longe aktivadis en ĝi; aŭ ni simple daŭrigu funkciigi ĝin en malalta nivelo, sen vera forto antaŭen, kio verŝajne konsistigus ian duon-mortan staton, sed kun espero, ke iam venos savonto sur blanka virĉevalo...

La sorto de la Esperanto-movado en Kebekio estas inter viaj manoj.

La venontan 26-a de septembro okazos la ĝenerala kunsido de la Esperanto-Societo Kebekia, en la Commensal, je 19 h 00
1720 strato Saint-Denis, Montrealo (metro Berri-UQAM)

Ne krokodilu!



Krokodili: parlar unu alia lingvo ol Esperanto kun unu Esperantisto aŭ dum unu Esperantista aktiveco. Por kelkaj, ĝi estas mortiga peĉo.

donc fondé une société et organisé annuellement deux ou trois rencontres d'une fin de semaine pendant plusieurs années, avec à chaque fois une trentaine de personnes, voire plus. En outre, on comptait deux clubs à Montréal et un à Sherbrooke, qui se réunissaient au moins deux fois par mois.

Il ne faut pas penser, cependant, que le noyau de membres actifs a toujours été le même. Loin de là! La société et son groupe de membres actifs ont compté, au fil des ans, des dizaines de jeunes espérantistes enthousiastes, mais qui nous ont à peu près tous quittés après quelques années. Il s'agit sans doute là du constat le plus triste que nous ayons à faire. Ces personnes ont souvent été membres du conseil, mais, le plus souvent, c'était juste pour donner un coup de main, ou pour faire avancer un projet qui les tenait à cœur. Cela est tout à fait correct, mais une association comme la nôtre a aussi besoin de personnes qui se sentent responsables d'elle et qui sont prêtes à accomplir aussi les tâches ennuyeuses ou répétitives. Il faut tenir les comptes, remplir des formulaires, éditer un magazine, tenir le site web à jour, réserver pour la prochaine réunion, etc.

Nous sommes donc devant trois possibilités. Ou bien de nouvelles personnes se manifesteront, prendront les rênes de la société (avec l'aide des anciens, si tel est leur désir) et insuffleront une vigueur nouvelle; ou bien nous devrons dissoudre la société, ce qui blesserait profondément ceux qui y ont consacré tant d'années; ou bien, nous continuerons à vivoter, sans y mettre plus de cœur que cela, tenant la société dans un état de mort-vivant, mais avec l'espoir d'un sauveur...

Le sort de la Société québécoise d'espéranto est entre vos mains.

Ce 26 septembre se tiendra l'assemblée générale annuelle de la Société québécoise d'espéranto, au Commensal, à 19 heures
1720, rue Saint-Denis, Montréal (métro Berri-UQAM)



Esperanto-Societo Kebekia
Société québécoise d'espéranto

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro: marte, junio, septembro kaj decembro. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Fotokopiita 90oble. Senpage por la membroj de la ESK. Por la aliaj, la jara abono kostas 10 kanadajn dolarojn. UEA-kodo de la Societo: kebk-d.

Redaktado: Normando Fleury (informo@esperanto.qc.ca). Grafismo kaj muntado: Francis Gauthier. Estraranoj de ESK: Boris-Antoine Legault (prezidanto), Martin Benoit (vicprezidanto), Sylvain Auclair (sekretario), Normand Fleury (kasisto), Suzanne Roy (konsilanto).

Limdato por la venonta eldono / Échéance pour le prochain numéro:
2009.12.01

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux: Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise avec mention obligatoire de la source. Photocopié à 90 exemplaires. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto.

Rédaction: Normand Fleury (informo@esperanto.qc.ca). Graphisme et montage: Francis Gauthier. Administrateurs de la SQE: Boris-Antoine Legault (président), Martin Benoit (vice-président), Sylvain Auclair (secrétaire), Normand Fleury (trésorier), Suzanne Roy (conseillère).

6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8
informo@esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca



Miaj genuoj kaj Esperanto

Francisko Lorrain

Saluton!

Jen mi parolos al vi pri miaj genuoj. Mi havas du. Ho, ĉu vi ankaŭ? Mi ĝojas, ĉar tiel vi pli bone komprenos tion, kion mi diros al vi pri genuoj. Mi timis, ke eble vi ne havus la saman nombron da genuoj kiel mi, kio malfaciligus mian taskon ĉi tie hodiaŭ. Mi iam konis viron, kiu havis tri da ili. Jes ja! Ne, mi ŝercas!

Tamen la nombro du gravas. El ambaŭ genuoj miaj, unu estas la dekstra genuo, la alia la maldekstra. Tio estas: dekstra kaj maldekstra el mia vidpunkto kompreneble, ne el la via. Cetere, se heziti inter mia vidpunkto kaj la via, nepre oni elektu la mian, kompreneble. Krome oni ja ne miksu miajn genuojn kun la viaj. Ne, ne, ne! Tio estus katastrofa. Imagu, se, anstataŭ proride frapi miajn proprajn genuojn, mi frapus la viajn!

En esceptaj cirkonstancoj, tamen, malsamhomaj genuoj povas ja intermiksiĝi... sed ne pri tio mi volas paroli al vi hodiaŭ.

Ni revenu al miaj genuoj. Paron da genuoj do mi havas. Nu, paro: la vorto ĝustas. Ĉar Esperanto estas perfekte logika, se mi havas du genuoj, unu devas estis la virnuo kaj la alia la nuino! Virnuo kaj nuino: genuoj. Nu la problemo estas, kiu estas la virnuo? Ĉu la dekstra aŭ la maldekstra?

La demando gravas, ĉar, kvankam ambaŭ estas tute egalrajtaj ktp, tamen ne decas tute same, seninspire trakti virnuon kiel nuinon. Ekzemple, trapasante pardonon, la virnuo lasu la nuinon pasi unue. Aŭ, se necesas apogi sin sur genuo en koto, la virnuo faru tion. Aŭ, se kruci la krurojn, la nuino sidu sur la virnuon! Kaj same en multaj okazoj de la ĉiutaga vivo.

Sed la diabla problemo estas: kiu el miaj genuoj estas vira, kiu ina? Kiu?!?! Ĉu vi ne scias? Mi malbenegas la logikon de Esperanto! Kial mi iun bonan tagon decidis lerni tiun lingvon? Sed kial plendi? La malbono estas jam farita kaj mi kapablas

nek mallerni Esperanton, nek malobsedigi pri tiu afero. Jen la malfacilega ekzistada problemo, kun kiu mi estas — ŝajnas — komdamita barakti, eble la reston de mia vivo.

Foje tio fariĝas por mi vera koŝmaro. Ŝvebas en mia menso la vortparoj liv-dekstr, dekstr-liv, vir-in, in-vir... Kaj tiam inside starigas sin la demando: « Ĉu eble estus malsame por ĉiu homo? » Tiam la homaro ne devus solvi nur unu ĝeneralan problemon, kun sama respondo por ĉiuj. Male ĉiu homo devus por si mem, per vojo malfacilega (kreditu min!), serĉi la ĝustan respondon por sia propra kazo, kaj eble ofte eĉ neniam trovus ĝin en sia tuta vivo.

Vere, la homa sorto priplorindas. Antaŭ tiaj problemoj oni demandas sin: « Kial oni ekzistas? Kial la universo ekzistas? Kiel fari eĉ unu paŝon en tiu universo, ne sciante kiu genuo viras, kiu inas? » En tia mondo, kia senpezigo devas esti fariĝi unukrurulo! Feliĉaj unukruruloj! Multaj el ili eĉ ne scias, kiajn turmentojn ilia kondiĉo evitigas al ili. Mi enviegas ilin.

Mi provis konvinki mian kuraciston, ke mia mensa sano necesigas tujan fortranĉon de unu el miaj kruroj. Li tute serioze aŭskultis min kaj diris: "Sed kiun kruron mi forprenu? La virnuo estas tiu, kiu devas oferi sin por la alia. Kiu estas la virnuo? Se, post la operacio, vi malkovrus, ke vi forprenigis la nuinon anstataŭ la virnuon, vi daŭre pentegus pri tio dum via tuta vivo!" Tio silencigis min kaj lasis min elĉerpita. Enmense mi lace ludis per la ideo fortranĉigi al mi ambaŭ gambojn, sed tia perspektivo, ial, deprimis min. Mi forlasis la kuraciston en profunda malespero.

Hazarde, hieraŭ, mi renkontis membron de la Akademio de Esperanto. Mi aŭdacis tuj konfidi al tiu impona sinjoro, malmultvorte tamen, mian problemegon. Li faris al mi kelkajn demandojn kaj, por mi surprize, konkludis, ke mia analizo ŝajnas al li tute trafa. Tiu ulo estas geniulo! (Aŭ ĉu mi diru virniulo? Aŭ, plej simple, niulo?) Kaj niulo li estas ne nur pro tio, ke li akceptis mian starpunkton, sed ankaŭ pro la konsilo, kiun li tuj donis al mi, pro kiu mi ĝismorte dankemos. Li konsilis al mi fondi societeton por la reformo de Esperanto per forlaso de ĉiuj mezepokeskaj balastajoj kiel, interalie, la radikoj ge, vir, in, la pronomoj li kaj ŝi, kaj tiel plu. Li kavalirece aldonis, ke, kvankam li mem ĉiam sekrete deziris fari tian elpaŝon, li neniam havis la kuraĝon plenumi sian vivdeziron, kaj nun, tro aĝa por ion ajn grandan entrepreni (pro tio li eniris la Akademion), li lasas al mi, iel mezaĝa kaj energiplena homo, la

Ne krokodilu!

Aligatori: parler la langue maternelle d'un espérantiste étranger plutôt que l'espéranto. On se demande alors pourquoi l'espéranto a été inventé.





honoron fariĝi, en la historio de Esperanto, la dua Zamenhof. Jes, la dua Zamenhof!

Tio estis por mi liberiĝa, luminiĝa momento. Sekve mi solene anoncas al vi la oficialan ekfondon de mia societo. Ne: de nia societo, en kiu, mi certas, vi ĉiuj tuj entuziasme enviciĝos. Ĝi nomiĝos... hm... jes: ĝi estos la Genro-Abolicia Societo Universala, mallonge GEASU. GEASU: memoru tion! Ho, mi ekkonscias, ke tiu siglo estas problema: GE-ASU. Ni fortranĉu la GE: nia societo nomiĝu pli simple ASU: Abolicia Societo Universala. Kaj, se iu demandas, kion ASU celas abolicigi, ni respondos tutsimple: "genron, kompreneble — ĉu vi neniam aŭdis pri ASU? Ĉu ne evidentas, ke la malamiko ĉefa estas genro." Ho, minuton! Tiu vorto "genro" mem estas problema: ge-nro! Ni celas la abolicion de nro! Ni estu la NASU — la Nro-Abolicia Societo Universala. Jen kio metos Esperanton sur la politikan mondmapon! Tremegu la fiaj ge-potenculoj de la mondo, kiel NASA, UN, EU kaj aliaj traboj kaj pajleroj en la okulo de la mondo. Ili ĉiuj tremegu: la resaniga cunamo NASU jam komencis rondiri la terglobon!

Ne krokodilu!

Kajmani: parler avec un espérantiste dans une langue autre que l'espéranto et qui n'est la langue maternelle d'aucun de deux participants. Les espérantistes maîtrisent souvent plusieurs langues et aiment le montrer...



Gaviali: parler espéranto dans une situation où une autre langue conviendrait davantage. Il y a un moment pour chaque langue...

Libera Esperanta kantaro-vikio iĝis 1000-kanta!

Dum la lastaj tagoj kvanto de kantotekstoj, haveblaj en kantaro-vikio superis 1000! Tio estas rezulto de kelkara internacia kunlaboro, farata de esperantistoj el la tuta mondo.

Danke al la vikia teknologio, la kantaro estas malfermita por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri muziko. Iu kunlaboranto povas enmeti novan kantotekston, alia korektas erarojn, plua alia povas aldoni muziknoton aŭ kompletigan informon, ktp.

Paŝon post paŝo la kantaro kreskas kaj iĝis vera helpilo por muzikemuloj. Ĝin uzas kaj komencantoj kaj spertuloj. La kantaro estas fonto de kantotekstoj por lernantoj kaj gvidantoj de E-kursoj. Fanoj trovas en ĝi kompletajn albumojn de ŝatataj muzikbandoj kaj videaĵojn de kantoj. Aŭtoroj kaj tradukantoj uzas ĝin por publikigi siajn verkaĵojn.

En la vikio haveblas kaj klasikaj kaj modernaj kantoj. Multas kantoj, tradukitaj el naciaj lingvoj, movadaj, por korusa plenumado, infanaj, rokaj, popaj kaj aliaj.

En la vikio vi povas trovi kanton diversmaniere: laŭ kategorio, nomo aŭ per frazo entekste.

Kantoj estas aranĝataj laŭ albumoj kaj albumoj eniras disko-grafiojn de la koncerna aŭtoro aŭ muzikbando. Por prezentado de la kantoj vi povas trovi muzikfoliojn, akordojn por gitarludado. Vi povas sekvi la kantotekston kaj ankaŭ spekti videajon aŭ uzi karaokeon.

Internacia teamo de kunlaborantoj gratulas uzantojn de kantaro-vikio je tiu cifero - 1000, kaj invitas ĉiujn, kiuj ĝis nun ne vizitis la kantaron fari tion, trovi ŝatatajn kantojn, aldoni komentojn kaj lasi impresojn en gastlibro.

Funkciadon de kantaro-vikio subtenas Eĉel, kiu dum jaroj gastigas ĝin en sia servilo, dankon!

Adreso de la kantaro-vikio: <http://ikso.net/kantaro/>

Muzikume,

Aleksej Kuznecov
ka2pink@gmail.com

laŭ [E-rus-info]

Ne krokodilu!



Lacerti: parler lors d'une activité espérantiste une autre langue planifiée. Sus à l'ennemi!



Albert Saint-Martin kaj lia malkonata agado por Esperanto

Se kredi kelkajn, kiuj unuafoje aŭdas la vorton “Esperanto”, ĝi estas nomo de religio. Ĉu sekve la naskiĝdato de Zamenhof, la 15a de decembro, devas esti... Kristnasko? Kaj kiu estas la naskiĝdato de nia kebekia Esperanta sanktulo? Kiu li aŭ ŝi estas? Ĉu la pastro Solis (1832–1903), la unua Esperantisto en Kanado kaj eble en Nordameriko? Ĉu François de Kinder, fondinto kaj long-tempa prezidanto de la Montreala Esperanto-Klubo (dum la jaroj 1950–60)? Ĉu Normand Fleury aŭ Zdravka Metz, kies vojoj kuniĝis tra la lastaj tridek jaroj?

Mi voĉdonas, por ke nia kebekia Esperanta sanktulo estu Albert Saint-Martin (1865–1947), ĉefa disvastiganto de Esperanto en Kanado dum preskaŭ la tuta unua duono de la dudeka jarcento. Jen priskribo de la moŝtulo.

Idealista batalanto

Une ni diru, ke Albert Saint-Martin ne esperantiĝis por vojaĝi aŭ amuziĝi. Tio estus grava miskompreno. Fama revoluciema socialista batalanto, Albert Saint-Martin estis membro de la Laborista Partio de Montrealo, kaj poste membro, kaj estro, de la franca sekcio de la Kanada Socialista Partio. Li estis konvinkita marksisto — el ege liberecema speco tamen — kaj vivis en senĉesa politika agado kaj agitado. La ĉefa celo de Esperanto, por li, estas ebligi al la proletoj de la tuta mondo harmoniigi siajn interesojn per uzado de komuna lingvo.

Disvastiganto de Esperanto

Albert Saint-Martin esperantiĝis ĉirkaŭ 1895, kiam li laboris kiel stenografisto. Plej eble varbis lin lia kolego Pierre Beauchemin. En 1902, ambaŭ amikoj komencas multe verki en la ĵus fondita revuo *La Lumo*. En la komenco de 1905, ili fondas la unuan klubon de Esperanto en Montrealo. En la sama jaro, dum la somero, ili partoprenas, en Bulonjo-ĉe-Mar, en la unua Universala Kongreso de Esperanto. Tie ili ambaŭ estas nomumataj membroj de la Lingva Komitato. En 1907 Saint-Martin kunfondas la Esperantan Kooperativon por helpi la senlaborulojn kaj malriĉajn laboristojn. Ĝis sia morto en 1947, li daŭre disvastigos Esperanton, interalie farante siajn paroladojn dum la Festo de Laboristoj en la franca kaj Esperanto!

Politika aktivulo

En 1899, li fondas la Sendependan Laboristan Partion kaj, en 1904, li partoprenas en la fondo de la Laborista Partio de Montrealo. En 1905, li kandidatiĝas samtempe por tiu partio kaj por la Kanada Socialista Partio en la urbocentra distrikto Saint-Jacques. Sed la Laborista Partio elpelos lin ĝuste pro sia aniĝo al la Socialista Partio, ĉar oni taksas ĉi-lastan organizaĵon tro libereca kaj radikala,

interalie pro ĝia kontraŭ-kapitalisma kritiko kaj kontraŭ-ŝtatismo. Krome, li estas konata kiel la organizanto de la unua manifestacio de la 1a de majo en Montrealo (1906). Tiu manifestacio poste fariĝis kutimo, kiu daŭris ĝis nun! Tiuj estas nur liaj plej gravaj agadoj, en vivo plene dediĉata al la laborista movado; ne ĉion povas rakonti mallonga artikolo.

Kooperativoj kaj la Universitato de Laboristoj

Ŝajnas, ke Saint-Martin pasigis sian tutan vivon, kreante demokratiajn kooperativojn kaj komunumajn instituciojn, kaj aktivante en ili. Ni menciuj kooperativajn nutrajvendejojn (“comptoirs alimentaires”) (1907), la Esperantan Kooperativon (1907), la Komitaton de Senlaboruloj (1914), la Humanan Asocion (“Association humanitaire”) (1914) kaj la Kamparan Komunumon (“Commune rurale”) (1915), poste detruotan de fajro.



En 1925, Saint-Martin kaj liaj kamaradoj fondas la Universitaton de Laboristoj, kiu havos senduban influon en popolaj medioj. Oni instruis tie diversajn temojn, ordinare ne flegeblajn de la proletoj: historion, literaturon, politikon, geografion, eĉ astronomion. Saint-Martin animis tie liberajn debatojn pri virinaj rajtoj, religio, aktualaj kaj internacia politiko. La establaĵo krome havis bibliotekon, ankaŭ detruotan tamen.

Malbenoj, batoj kaj persekutado

Sed la Universitato de Laboristoj ne eltenos la premadon de la katolika klerikaro, faŝistaj grupetoj kaj registaraj ĵurnaloj, kiuj senĉese fipentras ĝin. En 1930 atakas ĝin faŝistaj studentoj de la Universitato de Montrealo. Tio ripetiĝas la sekvantan jaron. Ĵurnaloj (ĉefe *Le Devoir*) premas, por ke oni fermu la Universitaton de Laboristoj. En 1933 la parlamento aprobas specialan leĝon por malfondi ĝin kaj Saint-Martin estas kulpigata pro “blasfemaj publikaĵoj”. Samjare, li estas malmilde batata de junaj faŝistoj. La universitato fine malaperas en 1935.

Francisko Gauthier

Fontoj:

http://fr.wikipedia.org/wiki/Albert_Saint-Martin http://fr.wikipedia.org/wiki/Albert_Saint-Martin

http://eo.wikipedia.org/wiki/Albert_Saint-Martin http://eo.wikipedia.org/wiki/Albert_Saint-Martin

<http://www.er.uqam.ca/nobel/k33440/premier.html> | “CHU LA PASTRO SOLIS (1832-1903)” [http://www.er.uqam.ca/nobel/k33440/premier.html#chu%20la%20pastro%20solis%20\(1832-1903\)](http://www.er.uqam.ca/nobel/k33440/premier.html#chu%20la%20pastro%20solis%20(1832-1903))

<http://lapagenoire.propagande.org/rayonsvirtuels/traces02.pdf> <http://lapagenoire.propagande.org/rayonsvirtuels/traces02.pdf>

Claude Larivière, *Albert Saint-Martin, militant d'avant-garde (1865–1947)*, Montrealo, Éditions coopératives Albert Saint-Martin, 1979



Montrealaj Esperanto-Kunvenoj (MEK)

La manĝoj en MEDO estas bona ebleco gustumi ion novan. Se vi planas veni, ni petas ke vi pretigu aŭ aĉetu ion laŭ la vespera temo. Necesas anonci vian alvenon kelkajn tagojn antaŭe, se vi volas partopreni: informo@esperanto.qc.ca.

Samtempe informu nin pri tio, kion vi planas kunporti. Vi povas ankaŭ alporti tipan trinkaĵon. Atentu ke temas pri bufedeca manĝo. Eblos varmigi manĝojn forne aŭ mikroondforne.

Pensu ankaŭ pretigi ion pri la temo por la vespera babilado. Kompreneble se vi ne deziras kunmanĝi, vi estas bonvena je la 20-a horo.

Si vous désirez participer aux repas communautaires thématiques, vous devez apporter un mets. Vous devez également confirmer votre présence quelques jours avant, en mentionnant le nom du plat. Si vous ne désirez pas participer au repas, vous êtes le bienvenu à partir de 20 heures.

Tago	Dato	Horo	Loko	Ĉe la menuo..
Vendredo	27-a de marto 2009	19 h	MEDO	Zingibro, varma spico por vintra tempo
Vendredo	24-a de aprilo 2009	18 h	MEDO	Latina Ameriko komuna manĝo
Vendredo	29-a de majo 2009	18 h	MEDO	Azia vespero komuna manĝo
Vendredo	26-a de junio 2009	19 h	Commensal	Monata renkontiĝo
Sabato	26-a de septembro 2009	19 h	Commensal	Jarkunsido ----> Ŝanĝo
Vendredo	30-a de oktobro 2009	18 h	MEDO	Germana vespero komuna manĝo
Vendredo	27-a de novembro 2009	18 h	MEDO	Slava vespero komuna manĝo
Sabato	12-a de decembro 2009	18 h	Commensal	150-a datreveno de L.L. Zamenhof

Pliaj Esperanto-renkontiĝoj

16-18 ^a de majo 2009	6 ^a MEKARO (Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto)	Toronto, Ontario
10-12 ^a de oktobro 2009	16 ^a ARE (Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto)	Silvero, NY, Usono
22-24 ^a de majo 2010	7 ^a MEKARO (Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto)	Tririvero, Kebekio
9-11 ^a de oktobro 2010	17 ^a ARE (Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto)	Silvero, NY, Usono
21-23 ^a majo 2011	8 ^a MEKARO (Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto)	Kingston, Ontario
19-21 ^a majo 2012	9 ^a MEKARO (Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto)	Kebeko, Kebekio

kaj?

En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto et un regroupement de club espérantistes. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à: riverego@esperanto.qc.ca

Montreala Esperanto-Domo (MEDO)
6358-A, rue de Bordeaux, Montréal, H2G 2R8
 (Vidu retejon por vidi kiel atingi)
 (Voir site web pour un plan d'accès)

Libroservo, biblioteko nepre kun antaŭa rendevuo
Librairie, bibliothèque sur rendez-vous seulement

Service de librairie postale à Montréal

Atentu ke la libroservo de KEA estos fermita de la mezo de junio ĝis la fino de septembro.
 Bondeziras al vi belan someron!

Service de librairie postale à Montréal

*Le service de librairie postale sera fermé de la mi juin à la fin septembre.
 Merci de votre compréhension. Bonne saison estivale!*
www.esperanto.qc.ca/katalogo

MEMO

Montreala Esperanto-Movado: www.esperanto-montreal.org